

Karlo Markso

Pri la juda demando

Karlo Markso

**Pri la juda
demando**

**Elgermanigita de Vilhelmo
Lutermano**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso: Pri la juda demando
verkita de aŭgusto ĝis decembro 1843.

Pri

Bruno Bauer: „Die Judenfrage [La juda demando]”,
Brunsviko, 1843;

Bruno Bauer: „Die Fähigkeit der Juden und Christen, frei zu
werden. Einundzwanzig Bogen aus der Schweiz [La kapablo
de judoj kaj kristanoj liberiĝi. Dudek unu folioj el
Svislando], eldonita de Georg Herwegh, Zuriko kaj
Vinterturo, 1843.

Laŭ: Deutsch-Französische Jahrbücher, 1-a duobla liveraĵo,
februaro 1844.

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2010

ISBN 978-2-918300-29-8

Enhavo

Antaŭparolo de la tradukinto.....	8
Robert Mandrou: Enkonduko.....	11
I Bruno Bauer: „La juda demando”, Brunsviko, 1843	14
II „La kapablo de la hodiaŭaj judoj kaj kristanoj emancipiĝi”	43

Antaŭparolo de la tradukinto

Tiu ĉi eseo estas unu el la plej fruaj de Karlo Markso – ĝenerale oni konsideras ĝin entute la dua, post lia *Pri la kritiko de la hegela jurfilozofio*. Ĝi estis verkita en la jaro 1843, do kvin jarojn antaŭ la *Manifesto de la Komunista Partio*.

La instigon traduki ĝin donis al mi disputo en la Esperantlingva diskutlisto pri politiko, en julio 2010, kie iuj prezentis senkontekstajn eltiraĵojn el tiu ĉi verko kaj traktis Markson kiel krudan kontraŭjudan judon, kiu eĉ inspiris Hitleron.

Kompreneble, post la gentekstermo, kiun la nazioj faris kontraŭ la judoj kiel „raso”, ni havas la devon zorge atenti ke io tia neniam ripetiĝu, nek pri judoj nek pri ajna alia gento, kaj ni devas do en nia epoko atenti pri nuancoj en nia lingvouzo, por ne doni al nuntempaj nazioj eĉ nur la ŝajnon de malĝusta impreso ke ni iel subtenas ilian rasismon. Kaj aliflanke la nuntempa batalo de la ideoj kondukas al provoj ĉiarimede fifamigi la fondintojn de la marksismo, per tio la marksismon mem, kaj per tio la plej fundan kritikon de la nuna ekonomia sistemo, des pli ke tiu troviĝas aktuale en krizaj konvulsioj (kiuj espereble ne kondukos al nova regiona aŭ eĉ monda milito – tiu granda klasika tento solvi per ĝi la problemon de superakumulado).

Bazon por tiaj fifamigoj certaj kontraŭkomunistoj¹ kredas trovi interalie en tiu ĉi verko de la juna Markso; kaj ne nur en la diverslingva makrosocio, kiel montras interalie la enkonduko de Robert Mandrou, sed ankaŭ en Esperantujo.

Mi citu ekzemplon:

1 Alia maniero ol misinterpreti la verkojn estas fiklaĉado pri la privata vivo de la aŭtoroj, citante nur iliajn deklaritajn malamikojn kaj tiel liverante pretekstojn por ne legi iliajn verkojn. Ankaŭ tiu metodo estas abunde uzata nialingve en la supre menciita diskutlisto.

Antaŭparolo de la tradukinto

„[...] Jen citeto el «Pri la Juda Demando» de Markso 1843:

«Ni konsideru la veran mondan Judon, ne la Sabatan Judon de Bauer, sed la ĉiutagan Judon. Ni ne serĉu por la sekreto de la Judo en lia religio, sed ni serĉu por la sekreto de la religio en la Judo. Kio estas la sekulara bazo de Judismo? Pragmata bezono, memintereso. Kio estas la monda religio de la Judo? Vendaĉismo. Kio estas lia monda dio? Mono.»
Fonto [...]

La tuta verko ankaŭ estas leginda por ekkompreni la sintenon kaj ĝisfundan malamon de Markso kontraŭ Judoj kaj Kristanoj.

[nomo de la skribinto]”

Necesas sobre legi la tekston por malkovri ke ĝi enhavas nenian rasismon, kaj ankaŭ ne en la formo de kontraŭjudismo. Markso montras, ke la emancipiĝo de la judoj ne povas esti aparta tasko, sen la emancipiĝo de iliaj kuncivitanoj.

Kroman utilon de tiu ĉi teksto mi vidas en la profunda analizado de la rolo de la religia ŝtato en la emancipiĝo – ŝtato en tiu analizo kristana, sed la analizo parte aplikeblas ankaŭ al juda, islama aŭ ajna religia ŝtato en la nuntempa mondo.

Mi ne emfazu la utilon legi ĉi tie la tekston en ĝia integra formo, dum pluraj tradukoj, ekz-e la franca, kiun mi en la reto konsultis, preterlasas tutajn paragrafojn². Kaj kompreneble mi ne parolu pri ties tradukeraroj, ĉar neniu tradukisto estas komplete libera de ili, nek tiu de ĉi Esperanta versio.

2 Ekz-e tiun sur paĝo 24 de „La neakordigeblo ... (ĝis) homrajto”. Konsultita ĉe:
www.marxists.org/francais/marx/works/1843/00/km18430001d.htm

Karlo Markso: Pri la juda demando

Mi esperas, ke MAS, eldonante tiun ĉi libron en Esperanto, povas kontribui al sobriigo kaj profundigo de la debatoj okazantaj aktuale en Esperantujo pri „Markso kaj la judoj”. Kaj ke per la legado de tiu ĉi libro samtempe akriĝos la vido pri la senkritike alvokata „libereco” en kuntekstoj, en kiuj tiu vorto kovras nenion alian ol la burĝan, do kapitalisman liberecon.

*Vilhelmo Lutermano,
Pedro Betancourt, julio 2010*

Robert Mandrou: Enkonduko

Zorgiga aktualeco – la renaskiĝo de la franca kontraŭjudismo post la Sestaga Milito en junio 1967 – instigis la respondeculojn de 10/18 reeldoni malbone konatan verkon de la juna Markso, *Pri la juda demando*: ofte citita, ĉefe de la kalumniantoj de la marksismo kiuj kompatas la kontraŭjudan judon, tiu libro meritas esta legata kun atento kaj honesteco. Ĝi bone montras la supraĵecon de tiu interesita kompatato; ĝi montras ankaŭ, en kia mezuro la juna Markso en la jaro 1843 jam posedis kelkajn esencajn elementojn de sia „sistemo”.

Per tiuj kvindek paĝoj pri la problemoj de la juda emancipiĝo Karlo Markso respondas al unu el siaj instruintoj, Bruno Bauer, kiu instruis al li la teologion en Berlino en la jaroj de 1836 ĝis 1840. Tiu protestanta teologo, kiu longe pristudis la *Vivon de Jesuo*, elpelita el sia katedro pro siaj aŭdacaj kritikoj en 1841, publikigis en la sekvaj jaroj plurajn aparte akrajn verkojn, kaj nome pri tiu ĉi problemoj, studaĵon kun la titolo *La juda demando*. Tiu teksto de Bruno Bauer estas ĉi tie publikigita post la respondo de Markso al li;¹ la demonstro farita de la berlina teologo estas cetere ne fremda al ĉiu ajn kiu interesiĝas pri la renoviĝo, kiun la 19-a jarcento donis al la malnova tradicia kontraŭjudismo. En sia lastatempa verko dediĉita al la samtempaj originoj de la kontraŭjuda rasismo, Léon Poliakov donis al Bauer merititan lokon. Antaŭ ĉio, tiu teksto ebligas mezuri la distancon kiu disigas la instruinton kaj la eksdisĉiplon, ĉar tiu lasta klarigas plej klare la poziciojn de Bauer, almenaŭ pri la situacio de Germanio kaj de centra Eŭropo, do en la kristanaj ŝtatoj, kie la religio estis tiam daŭre konsiderata ŝtatreligio kaj kie la judoj vivis de jarcentoj apartigitaj disde la cetera loĝantaro. Bruno Bauer verkis sian traktaton kiel teologo nutrita de hegela pensado, Markso respondas al li kiel historiisto kaj sociologo samtempe, atenta pri la reli-

1 Tamen, en tiu ĉi Esperanta versio, la teksto de Bauer ne aperas krom en la citaĵoj faritaj de Markso en sia respondo. -vl

gieco kiel pri la religio mem, kaj zorge montranta la iluziojn de la bona konscienco de la franca burĝa socio.

„Ni devas emancipi nin mem antaŭ ol povi emancipi la aliajn“: tiun simplan formulon kiun Markso reprenas de Bauer ebligas al li klare montri sian teorion de fremdiĝo, tiel kiel la germana socio povas illustri ĝin. La germanaj judoj postulas la nuligon de la disonoj kiuj izolas ilin en la urboj kaj en la kamparo: judaj kvartaloj en la grandaj urboj, vilaĝoj en kiuj loĝas nur ili, ĉefe en la suda Germanio. Same kiel la francaj judoj kvindek jarojn antaŭe atingis la nuligon de la laŭkorpa pago, la agnoskon de ilia ne limigita libereco je kulto, same la germanaj judoj postulas la civitanan egal-econ kaj la religiajn liberecojn. Markso montras kiel tiu emancipiĝo kondiĉas burĝan socion kiu realigis certajn transformojn kaj forigis la feŭdan reĝimon. La germana socio en la unua duono de la 19-a jarcento ne estas ĉe tiu punkto: „Ne ekzistas civitanoj en Germanio“, skribas li por montri ke tiu emancipiĝo de la judoj ne kompreniĝas sen tiu de ĉiuj germanoj, kiuj estas ankoraŭ submetitaj al „teologi-aj“ ŝtatoj kiuj konfuzas la religion kaj sian potencon kaj ne povas agnoski civilan socion kie la homo estus „profana estaĵo“. Antaŭ ĉio, Karlo Markso poziciigas tiun postulon de la judoj en rilaton al ilia situacio en la getoj de centra Eŭropo. Ilia „himeras nacieco“ kompreneblas nur per tiu apartigita ekzistado: ĝi montras iliajn aktivecojn kaj, kompreneble, ilian memkonscion, en Vieno² kiel en okcidenta Germanio: eĉ la ŝajne malestimaj formuloj uzataj de Markso en siaj lastaj paĝoj kompreniĝas per tiu identiĝo de la karakteroj propraj al la judaj grupoj enfermitaj en siaj komunumoj. Tiuj mokaj vortoj (same kiel la insultoj ofte cititaj kiuj aperas en liaj korespondaĵoj, „miela judo“ ekze ...) ne montras ofte denuncatan memmalamon („jüdischen Selbsthass“) aŭ memoraĵojn el la infaneco kiujn lastatempe

2 Ĉefurbo de la tiama – diserigita – Germanio (sidejo de la imperiestro kaj de la imperia registaro). -vl

la psiĥanalisto Arnold Künzli elvokis, sed senkomplezan klarvidon pri la mitoj kaj fantasmoj estiĝintaj per multjarcenta aparteco trudita al tiuj getoj. Emancipiĝo politika, emancipiĝo homa, la juda problemo ŝuldas al tiuj trajtoj sian specifecon.

En sia teksto Markso longe analizas la kontraŭdirojn entenatajn en la plej solenaj deklaroj de la burĝa socio: tiuj de 1791 kaj 1793 en Francio kaj tiuj de diversaj nordamerikaj ŝtatoj dum ilia sendependiĝo. Inter la ĝenerala difino de libereco, „*kiu malutilas al neniu*”, kaj la principo de privata proprieto, kiu konsekras la rajton de la individuo ĝui siajn enspezojn, rentojn kaj produktojn el sia posedaĵoj sen okupiĝi pri la malutiloj kiujn ili kaŭzas al aliuloj, Markso montras unu el la plej fortaj iluzioj de la burĝa bona konscienco kaj kiajn maljustaĵojn la solena kaj supraĵa alvoko de la libereco povas kaŝi. Jen instruo utila kaj ĉiam forgesita, ĝi estas unu el la plej sagacaj komentoj de la grandaj tekstoj ellaboritaj fine de la 18-a jarcento. Same kiel la longa difinado de la necesa laikeco de la ŝtato kiel etapo de la homa emancipiĝo, tiu akra kritiko de la revoluciaj ŝajnigoj estas ankaŭ tiom aktuala ke ĝi pravigus reeldonon.

Resume, nek Bruno Bauer nek Markso konsidereblas kiel aŭtoroj kontraŭjudaj [„antisemitaj”] en la komuna senco de la vorto; certe, iliaj tekstoj, tro rapide legitaj aŭ miskomprenitaj, de malbonintencaj komentistoj, povis esti uzataj maltrafe, kiam la nuntempa kontraŭjudismo elformiĝas ĉe la jarcentŝanĝiĝo. Prefere legi ilin kiel profundajn kaj trafajn atestojn pri fundamenta problemo heredita de la feŭda reĝimo: la apartismo de la judoj kaj ilia homa emancipiĝo. Tiusence *Pri la juda demando* restas granda libro.

[Fonto: „*La Question Juive – K. Marx – Introduction par Robert Mandrou*”:

www.marxists.org/francais/marx/works/1843/00/km18430001c.htm]

I Bruno Bauer: „La juda demando”, Brunsviko, 1843

La germanaj judoj postulas la emancipiĝon. Kian emancipiĝon ili postulas? La *civitanan*, la *politikan* emancipiĝon.

Bruno Bauer respondas al ili: Neniu en Germanio estas politike emancipita. Ni mem ne estas liberaj. Kiel ni povus liberigi vin? Vi judoj estas egoistoj, se vi postulas apartan emancipiĝon por vi kiel judoj. Vi devus, estante germanoj, labori por la politika emancipiĝo de Germanio, kiel homoj por la homa emancipiĝo kaj senti la apartan manieron de via premo kaj de via honto ne kiel escepton el la regulo, sed male kiel konfirmon de la regulo.

Aŭ ĉu la judoj postulas egaligon kun la *kristanaj subuloj*? Tiam ili agnoskas la kristanan ŝtaton kiel pravan, tiam ili agnoskas la reĝimon de ĝenerala subjugado. Kial ilia speciala jugo malplaĉas al ili, se la ĝenerala jugo al ili plaĉas? Kial la germano interesiĝu pri la liberigo de la judoj, se la judo ne interesiĝas pri la liberigo de la germano?

La *kristana* ŝtato konas nur *privilegiojn*. La judo posedas en ĝi la privilegion esti judo. La havas kiel judo rajtojn, kiujn la kristanoj ne havas. Kial li postulas rajtojn, kiujn li ne havas kaj kiujn ĝuas la kristanoj!

Se la judo volas esti emancipita de la kristana ŝtato, li postulas ke la kristana ŝtato forlasu sian *religion* antaŭjuĝon. Ĉu li, la judo, forlasis sian religion antaŭjuĝon? Ĉu li do havas la rajton postuli de iu alia tiun forlason de la religio?

La kristana ŝtato *laŭ sia esenco* ne povas emancipi la judon; sed, aldonas Bauer, la judo ne emancipeblas laŭ sia esenco. Tiom longe, kiom la ŝtato estas kristana kaj la judo juda, ambaŭ estas nekapablaj same emancipi kiel emancipiĝi.

La kristana ŝtato povas kondukti al la judo nur en la maniero de la ŝtato kristana, tio signifas privilegianta, per tio ke

li permesas la apartiĝon de la judo disde la ceteraj subuloj, tamen sentigante al li la premon de la aliaj apartigitaj sferoj kaj des pli forte sentigante ĝin ĉar la judo staras en *religia* opozicio al la reganta religio. Sed ankaŭ la judo povas kondukti al la ŝtato nur jude, tio signifas al la ŝtato kiel al fremdulo, per tio ke li kontraŭmetas al la reala nacieco sian ĥimeran naciecon, al la reala leĝo sian iluzian leĝon, per tio ke li kredas sin rajtigita je apartiĝo disde la homaro, per tio ke li principe ne partoprenas en la historia movado, per tio ke li atendas estontecon, kiu havas nenion komunan kun la ĝenerala estonteco de la homoj, per tio ke li kredas sin membro de la juda popolo kaj la juda popolo sin kiel la elektita popolo.

Do, laŭ kiu titolo vi judoj postulas la emancipiĝon? Ĉu pro via religio? Tiu estas la ĝismorta malamiko de la ŝtata religio. Kiel civitanoj? En Germanio ne ekzistas civitanoj. Kiel homoj? Vi ne estas homoj, same kiel tiuj, kiujn vi alvokas.

Bauer starigis la demandon de la juda emancipiĝo nove, post kiam li kritikis la ĝisnunajn poziciojn kaj solvojn de la demando. Kiaj, demandas li, ili estas, la judo, kiu volas emancipiĝi, la kristana ŝtato, kiu devas emancipi? Li respondas per kritiko de la juda religio, li analizas la *religian* kontraŭecon inter judismo kaj kristanismo, li komprenigas pri la kristana ŝtato, ĉion ĉi kun aŭdaco, akreco, spirito, ĝisfundeco en same preciza kiel kerna kaj energia skribmaniero.

Kiel Bauer do solvas la judan demandon? Kia la rezulto? La formulado de demando estas ĝia solvo. La kritiko de la juda demando estas la respondo al la juda demando. La resumo estas do jena:

Ni devas emancipi nin mem, antaŭ ol povi emancipi aliuojn.

La plej rigida formo de la kontraŭeco inter la judo kaj la kristano estas la *religia* kontraŭeco. Kiel oni solvas kontraŭecon? Per tio ke oni malebligas ĝin. Kiel oni malebligas *religian* kontraŭecon? Per tio ke oni *nuligas la religion*. Ekde kiam judo kaj kristano ekkonas siajn reciprokajn religiojn jam nur kiel *diversajn evoluŝtupojn de la homa spirito*, kiel diversajn de la *historio* demetitajn serpenthauĵojn kaj la homon kiel la serpenton kiu ŝanĝas en ili sian haŭton, ili jam ne troviĝas en religia, sed jam nur en kritika, *scienca*, en homa rilato. Sed kontraŭecoj en la scienco solviĝas per la scienco mem.

Al la germana judo kontraŭmetiĝas la manko de politika emancipiĝo entute kaj la malimplicita kristaneco de la ŝtato. Sed en la senco de Bauer, la juda demando havas ĝeneralan, de la specife germanaj kondiĉoj sendependan signifon. Ĝi estas demando de la rilato de la religio al la ŝtato, de la *kontraŭdiro de la religia antaŭjuĝo kaj la politika emancipiĝo*. La emancipiĝo el la religio estas metita kiel kondiĉo, tiel al la judo kiu volas esti politike emancipita, kiel al la ŝtato, kiu devas emancipi kaj esti mem emancipita.

„Bone, oni diras, kaj la judo diras tion mem, la judo devas esti emancipota ja ne kiel judo, ne ĉar li estas judo, ne ĉar li havas tiom elstaran ĝenerale homan principon de moralo, la *judo* male cedos malantaŭ la *civitanon* kaj estos *civitano*, kvankam li estas judo kaj restu judo, t.e. li estas kaj restas *judo*, malgraŭ ke li estas *civitano* kaj vivas en ĝeneralaj homoj kondiĉoj; lia juda kaj limigita eco ĉiam kaj fine venkas super liaj homaj kaj politikaj devoj. La *antaŭjuĝo* restas, kvankam ĝi estas superata de *ĝeneralaj* principoj. Sed se ĝi restas, tiam ĝi superas ĉion alian.” „Nur sofisme, laŭ la ŝajno, la judo povus resti judo en la ŝtata vivo; la nura ŝajno, se li volus resti judo, estus la esenco kaj venkus, t.e. lia vivo en la *ŝtato* estus nur ŝajno aŭ nur momenta escepto kontraŭ la esenco kaj la regulo.”¹

1 „La kapablo de la hodiaŭaj judoj kaj kristanoj liberiĝi.” „Dudek unu folioj”, p. 57.

Ni aŭdu aliflanke, kiel Bauer metas la taskon de la ŝtato.

„Francio”, laŭdire, „donis al ni lastatempe² koncerne la judan demandon – kiel konstante en ĉiuj aliaj *politikaj* demandoj – la aspekton de vivo kiu estas libera, sed kiu en la leĝo revokas ĝian liberecon, do deklaras ĝin ankaŭ ŝajno kaj aliflanke refutas sian liberan leĝon per la ago.”³

„La ĝenerala libereco estas en Francio ankoraŭ ne leĝo, la juda demando ankaŭ ankoraŭ *ne* solvita, ĉar la leĝa libereco – ke la civitanoj estas egalaj – estas limigita en la vivo, kiu estas ankoraŭ dominata kaj disdivita de la religiaj privilegioj, kaj ĉar tiu mallibereco de la vivo retroefikas sur la leĝo kaj devigas ĝin sankcii la distingon de la oficiale liberaj civitanoj en subprematojn kaj subpremantojn.”⁴

Kiam do la juda demando estus solvita en Francio?

„La judo ekz-e certe estus ĉesinta esti judo, se li ne lasus sin malhelpi per sia leĝo plenumi siajn devojn rilate al la ŝtato kaj al siaj kuncivitanoj, do ekz-e dum sabato iri en la ĉambro de la deputitoj kaj partopreni en la publikaj debatoj. Ĉia *religia privilegio* entute, do ankaŭ la monopolo de privilegiita eklezio, devus esti nuligita, kaj se kelkaj aŭ pluraj aŭ eĉ la *granda plimulto ankoraŭ kredus devi plenumi religiajn devojn*, tiam tiu plenumado devus esti lasita kiel *pura privata afero* al ili mem.”⁵

„Jam ne ekzistas religio, kiam ne plu ekzistas privilegiita religio. Prenu al la religio ĝian ekskludan forton, kaj ĝi jam ne ekzistas.”⁶ „En la *propono* ne menciis en la leĝo la dimanĉon, s-ro Martin du Nord vidis la proponon deklari ke la kristanismo ĉesis ekzisti, samrajte (kaj tiu rajto estas perfekte fundita) la deklaro, ke la leĝo de la juda sabato jam ne estas deviga por la judoj, estus la proklamo ke la judismo ĉesis ekzisti.”⁷

2 Debatoj de la deputita ĉambro de la 26-a de decembro 1840.

3 „Judenfrage”, p. 64.

4 Saml., p. 65.

5 Saml.

6 Saml., p. 66.

7 Saml., p. 71.

Bauer postulas do unuflanke ke la judo forlasu la judismon, kiel entute la homo la religion, por emancipiĝi *civitane*. Aliflanke, por li la politika nuligo⁸ de la religio estas por li konsekvence la forigo de la religio entute. La ŝtato, kiu premisas la religion, estas ankoraŭ ne vera, ne reala ŝtato.

„Efektive la religia imago donas al la ŝtato garantiojn. Sed al kiu ŝtato? Al *kia ŝtato?*”⁹

En tiu punkto aperas la *unuflanka* koncepto de la juda demando.

Tute ne sufiĉas esplori: Kiu emancipu? Kiu emancipiĝu? La kritiko havas trian taskon. Ĝi devas demandi: *Pri kia emancipiĝo* temas? Kiuj kondiĉoj estas en la esenco de la postulata emancipiĝo? La kritiko de la *politika emancipiĝo* mem estis nur la fina kritiko de la juda demando kaj ĝia vera solvo en la „*ĝenerala demando de la epoko*”.

Ĉar Bauer levas la demandon ne sur tiu nivelo, li falas en kontraŭdirojn. Li starigas kondiĉojn, kiuj ne estas funditaj en la esenco mem de la *politika* emancipiĝo. Li levas demandojn, kiujn lia tasko ne entenas, kaj li solvas taskojn, kiuj lasas lian demandon nerespondita. Kiam Bauer diras pri la kontraŭuloj de la juda emancipiĝo: „Ilia eraro estis nur tiu, ke ili premisas la kristanan ŝtaton kiel la sole veran kaj ne submetis ĝin al la sama kritiko, per kiu ili konsideris la judismon” (p. 3), tiam ni trovas la eraron de Bauer en tio, ke li submetas al la kritiko nur la „kristanan ŝtaton”, ne la „ŝtaton ĝenerale”, ke li ne esploras la *rilaton de la politika emancipiĝo al la homa emancipiĝo* kaj pro tio starigas kondiĉojn kiuj klarigeblas nur el senkritika konfuzo de la politika emancipiĝo kun la ĝenerale homa. Kiam Bauer

8 En la originalo, ĉi tie kaj en la sekvo: *Aufhebung*, do pli precize „*aŭfhebo*”, kiu signas, laŭ la dialektika lingvouzo, nuligadon, forigon, sed samtempe konservadon kaj reaperon en nova kvalito. -vl

9 Saml., p. 97.

demandas la judojn: Ĉu el via starpunkto vi havas la rajton postuli la *politikan emancipiĝon*? tiam ni demandas inverse: Ĉu la starpunkto de la *politika* emancipiĝo havas la rajton postuli de la judoj la forigon de la judismo, kaj entute de la homoj la forigon de la religio?

La juda demando leviĝas malsame, laŭ la ŝtato en kiu la judo troviĝas. En Germanio, kie ne ekzistas politika ŝtato, nenia ŝtato kiel ŝtato, la juda demando estas pure *teologia* demando. La judo troviĝas en religia kontraŭeco al la ŝtato, kiu konfesas la kristanecon kiel sian bazon. Tiu ŝtato estas teologo *ex professo* [de ofico]. La kritiko estas ĉi tie kritiko de la teologio, dutranĉa kritiko, kritiko de la kristana, kritiko de la juda teologio. Sed tiel ni moviĝas daŭre en la teologio, kiom ajn ni moviĝas en ĝi *kritike*.

En Francio, en la *konstitucia* ŝtato, la juda demando estas demando de la konstituciismo, la demando de la *malperfekteco de la politika emancipiĝo*. Ĉar en Francio la *ŝajno* de ŝtata religio estas konservata, kvankam en sensignifa kaj sin mem kontraŭdira formulo, en la formulo de *religio de la plimulto*, tial la rilato de la judoj al la ŝtato konservas la *ŝajnon* de religia, teologia kontraŭeco.

Nur en la nordamerikaj liberaj ŝtatoj – almenaŭ en kelkaj de ili – la juda demando perdas sian teologian signifon kaj fariĝas vere sekulara demando. Nur kie la politika ŝtato ekzistas en sia kompleta elformiĝo, tie la rilato de la judo, entute de la religia homo, al la politika ŝtato, do la rilato de la religio al la ŝtato, povas aperi en sia aparteco, en sia pureco. La kritiko de tiu rilato ĉesas esti teologia kritiko, ekde kiam la ŝtato ĉesas teologie rilati al la religio, ekde kiam ĝi kondukas al la religio ŝtate, t.e. politike. La kritiko fariĝas tiam kritiko de la politika ŝtato. En tiu punkto, kie la demando ĉesas esti teologia, la kritiko de Bauer ĉesas esti kritika.

„Il n'existe aux Etats-Unis ni religion de l'état, ni religion décla-

Karlo Markso: Pri la juda demando

rée celle de la majorité ni prééminence d'un culte sur un autre. L'état est étranger à tous les cultes."¹⁰ Jes, ekzistas kelkaj nordamerikaj ŝtatoj, kie „*la constitution n'impose pas les croyances religieuses et la pratique d'un culte comme condition des privilèges politiques*» (l. c. p. 225). Tamen „*on ne croit pas aux Etats-Unis qu'un homme sans religion puisse être un honnête homme*” (saml. p. 224).

„*En Usono ekzistas nek ŝtata religio, nek oficiala religio de la plimulto, nek la antaŭrangeco de iu kulto super la alia. La ŝtato okupiĝas pri neniu el la kultoj.*”¹¹ Jes, ekzistas kelkaj nordamerikaj ŝtatoj, kie „*la konsitucio faras nenian religian kredon aŭ la praktikadon de ia kulto kondiĉo de politikaj privilegioj*” (saml., p. 225). Tamen „*oni ne kredas en Usono ke homo sen religio povus esti honestulo*” (saml., p. 224).

Tamen Nordameriko estas ĉefe la lando de religieco, kiel Beaumont, Tocqueville kaj la anglo Hamilton unuanime asertas. La nordamerikaj ŝtatoj estas por ni nur ekzemplo. La demando estas: Kiel la *finita* politika emancipiĝo rilatas al la religio? Se ni trovas eĉ en la lando de la finita politika emancipiĝo ne nur la ekziston, sed la *vive freŝan*, la *vive fortan* ekziston de la religio, tiam ni havas la pruvon ke la ekzisto de la religio ne kontraŭdiras perfektigon de la ŝtato. Sed ĉar la ekzisto de religio estas la ekzisto de manko, tial la fonto de tiu manko serĉendas jam nur en la *esenco* de la ŝtato mem. La religio estas por ni ne plu la *kaŭzo*, sed jam nur la *fenomeno* de la sekulara limigiteco. Ni deklaras do la religian embarason de la liberaj civitanoj el ilia sekulara embaraso. Ni ne asertas ke ili devas forigi sian religian limigitecon por forigi siajn sekularajn barojn. Ni asertas ke ili forigas sian religian embarason ekde kiam ili forigas sian sekularan baron. Ni ne transformas la sekularajn demandojn en teologiajn. Ni transformas la teologiajn demandojn en sekularajn. Post kiam la historio estis sufiĉe longe dis-

10 Marie ou l'esclavage aux Etats-Unis etc., par G. de Beaumont. Paris 1835, p. 214.

11 Saml.

solvita en la superstiĉo, ni dissolvas la superstiĉon en historion. *La demando de la rilato de la politika emancipiĝo al la religio* fariĝas por ni la demando de la *rilato de la politika emancipiĝo al la homa emancipiĝo*. Ni kritikis la religian malfortecon de la politika ŝtato per tio ke ni kritikis la politikan ŝtaton, *sendepende* de la religiaj malfortecoj, en ĝia *sekulara* konstruo. La kontraŭdiron de la ŝtato kun *certa religio*, ekzemple la judismo, ni homigas en la kontraŭdiron de la ŝtato kun *certaj sekularaj elementoj*, la kontraŭdiron de la ŝtato kun la *religio entute*, en la kontraŭdiron de la ŝtato kun ĝiaj *premisoj* entute.

La *politika* emancipiĝo de la judo, de la kristano, entute de la *religia* homo, estas la *emancipiĝo* de la ŝtato el la judismo, el la kristanismo, entute el la *religio*. En sia formo, en la maniero propra al sia esenco, kiel *ŝtato*, la ŝtato emancipiĝas el la religio per tio ke ĝi emancipiĝas el la ŝtata religio, t.e. per tio ke la ŝtato kiel ŝtato konfesas nenian religion, per tio ke ĝi konfesas sin kiel ŝtaton. La *politika* emancipiĝo el la religio ne estas la plenumita, la senkontraŭdira maniero de la *homa* emancipiĝo.

La limo de la politika emancipiĝo aperas tuj en tio ke la *ŝtato* povas liberigi sin el baro, sen ke la homo estus *reale* libera de ĝi, ke la ŝtato povas esti *libera ŝtato*, sen ke la homo estus *libera* homo. Bauer mem silente koncedas tion, kiam li metas jenan kondiĉon de la politika emancipiĝo:

„Ĉia religia privilegio entute, do ankaŭ la monopolo de privilegiita eklezio, devus esti forigita, kaj se kelkaj aŭ pluraj aŭ eĉ *la granda plimulto kredus ankoraŭ devi plenumi religiajn devojn*, tiam tiu plenumado devus esti kiel *pura privata afero* lasita al ili mem.”

La ŝtato povas do esti emancipiĝinta el la religio, eĉ se la *granda plimulto* estas ankoraŭ religia. Kaj la *granda plimulto* ne ĉesas esti religia per tio ke ĝi estas *religia private*.

Sed la konduto de la ŝtato al la religio, speciale de la

libera ŝtato, estas ja nur la konduto de la homoj, kiuj konsistigas la ŝtaton, al la religio. El tio sekvas, ke la homoj liberigas sin *pere de la ŝtato*, ke li liberigas sin *politike* el baro, per tio ke li en kontraŭdiro kun si mem levas sin, en abstrakta kaj limigita, en parta maniero, super tiun baron. El tio sekvas krome, ke la homo, liberigante sin *politike*, liberigas sin per *ĉirkaŭvojo*, pere de *perilo*, kvankam per *necesa perilo*. Fine sekvas, ke la homo, eĉ se li, tra la perado de la ŝtato, deklaras sin ateisto, t.e., se li proklamas la ŝtaton ateisto, restas daŭre en religia embaraso, ĝuste ĉar li agnoskas sin nur per *ĉirkaŭvojo*, nur pere de perilo. La religio estas ja la agnosko de la homo per *ĉirkaŭvojo*. Pere de *peranto*. La ŝtato estas la peranto inter la homo kaj la libereco de la homo. Kiel Kristo estas la peranto, sur kiun la homo ŝarĝas sian tutan diecon, sian tutan *religion embarason*, tiel la ŝtato estas la peranto, en kiun li demetas sian tutan nediecon, sian tutan *homan neembarason*.

La *politika* leviĝo de la homo super la religion dividas ĉiujn mankojn kaj ĉiujn avantaĝojn de la politika leviĝo entute. La ŝtato kiel ŝtato nuligas ekz-e la *privatan proprieton*, la homo deklaras en *politika* maniero la privatan proprieton *nuligita*, ekde kiam li levas la censon por aktiva kaj pasiva elektorajto, kiel tio okazis en multaj nordamerikaj ŝtatoj. *Hamilton* interpretas tiun fakton el politika vidpunkto tute ĝuste tiel: „*La granda amaso venkis super la proprietuloj kaj super la monriĉeco.*” Ĉu la privata propio ne estas ideo nuligita, kiam la neposedanto fariĝis la leĝdonanto de la posedanto? La *censo* estas la lasta *politika* formo agnoski la privatan proprieton.

Tamen per la politika nuligo de la privata propio la privata propio estas ne nur ne nuligita, sed eĉ premisita. La ŝtato nuligas la distingon de deveno, de stato, klereco, aparta okupo siamaniere, kiam ĝi deklaras devenon, staton, klerigadon, apartan dungon nepolitikaj diferencoj, kiam ĝi deklaras senrigarde al tiuj diferencoj ĉiun membron de la

popolo sama partoprenanto de la popola suvereneco, kiam ĝi traktas ĉiujn elementojn de la reala popola vivo el ŝtata vidpunkto. Malgraŭ tio la ŝtato lasas la privatan proprieton, la klerigadon, la apartan dungon agi siamaniere, t.e. kiel privata proprieto, kiel klerigado, kiel aparta dungo, kaj sekvi sian apartan naturon. Anstataŭ forigi tiujn faktajn diferencojn, ĝi male ekzistas nur sub ilia premiso, sentas sin kiel politika ŝtato kaj montras sian ĝeneralecon nur en kontraŭeco al unu el tiuj siaj elementoj. Hegelo difinas la rilaton de la politika ŝtato al la religio do tute ĝuste, kiam li diras:

„Por ke [...] la ŝtato estiĝu kiel la sin scianta morala realaĵo de la spirito, necesas ke ĝi estu distingita disde la formo de la aŭtoritato kaj de la kredo; sed tiu distingo nur aperas tiom kiom la ekzlezia flanko en si mem venas al disiĝo; nur tiel super la apartaj eklezioj la ŝtato gajnis la ĝeneralecon de la penso, la principon de sia formo, kaj ekzistigas ĝin”.¹²

Jes ja! Nur tiel *super* la *apartaj* elementoj la ŝtato konstituigas kiel ĝeneraleco.

La perfekta politika ŝtato estas laŭ sia esenco la specia vivo de la homo kontraste al lia materia vivo. Ĉiuj premisoj de tiu egoisma vivo restas ekzistantaj ekster la ŝtata sfero de la burĝa socio, sed kiel ecoj de la burĝa socio. Kie la politika ŝtato atingis sian veran elformiĝon, la homo vivas ne nur en la penso, en la konscio, sed en la realeco, en la vivo, duoblan vivon, ĉielan kaj teran, la vivon en la politika komunumo, en kiu li konsideras sin komunuma estulo, kaj la vivon en la burĝa socio, en kiu li agas kiel privatulo, kiu konsideras la ceterajn homojn rimedo, malaltigas sin mem al rimedo kaj fariĝas ludilo de fremdaj potencoj. La politika ŝtato rilatas same spiritisme al la burĝa socio kiel la ĉielo al la tero. Ĝi staras en la sama opozicio al ĝi, ĝi venkas ĝin en la sama maniero kiel la religio venkas la limigitecon de la

12 Hegel: Rechtsphilosophie [Hegelo: Jurfilizofio], 1-a eldono, p. 346)

profana mondo, t.e. per tio ke ĝi devas ĝin ankaŭ agnoski, restarigi, lasi sin mem domini de ĝi. La homo en sia plej proksima realeco, en la burĝa socio, estas profana estaĵo. Ĉi tie, kie li konsideras sin mem kaj la aliaj lin reala individuo, li estas ne aŭtenta fenomeno. En la ŝtato, male, kie la homo estas konsiderata speciuolo, li estas la imaga membro de imagita suvereneco, li estas senigita je sia reala individuo vivo kaj plenigita je nereala ĝeneraleco.

La konflikto, en kiu la homo troviĝas kiel konfesanto de aparta religio kun sia ŝtata civitaneco, kun la ceteraj homoj kiel membroj de la komunumo, reduktiĝas al la sekulara fendiĝo inter la *politika* ŝtato kaj la *burĝa socio*. Por la homo konsiderata kiel *bourgeois* [ĉi tie: kiel membro de la burĝa socio] la „vivo en la ŝtato estas nur ŝajno aŭ momenta escepto kontraŭ la esenco kaj la regulo“. Tamen la *bourgeois*, kiel la judo, restas nur sofisme en la ŝtata vivo, kiel la *citoyen* [civitano] restas nur sofisme judo aŭ *bourgeois*; sed tiu sofismo ne estas persona. Ĝi estas *sofismo de la politika ŝtato* mem. La diferenco inter la religia homo kaj la civitano estas la diferenco inter la komercisto kaj la civitano, inter la taglaboristo kaj la civitano, inter la grundposedanto kaj la civitano, inter la *vivanta individuo* kaj la *civitano*. La kontraŭdiro, en kiu la religia homo troviĝas kun la politika homo, estas la sama kontraŭdiro, en kiu la *bourgeois* troviĝas kun la *citoyen*, en kiu membro de la burĝa socio troviĝas kun sia *politika leonhaŭto*.

Tiun sekularan kontraŭecon, al kiu la juda demando fine reduktiĝas, la rilaton de la politika ŝtato al siaj premisoj, egale ĉu temas pri materiaj elementoj, ekzemple privata proprieto ktp, aŭ spiritaĵoj, ekzemple klerigado, religio, la kontraŭecon inter la *ĝenerala* intereso kaj la *privata* intereso, la fendon inter la *politika ŝtato* kaj la *burĝa socio*, tiun sekularan kontraŭecon Bauer lasas daŭre ekzisti, dum li polemikas kontraŭ ilian *religian* esprimiĝon.

„Ĝuste ĝia bazo, la bezono, kiu certigas la ekzistadon al la

burĝa socio kaj *garantias ĝian neceson*, elmetas ĝian ekzistadon al konstantaj danĝeroj, nutras en ĝi malcertan elementon kaj produktas tiun konstante ŝanĝiĝantan miksaĵon el malriĉeco kaj riĉeco, mizero kaj prospero, kaj la ŝanĝon entute.” (p. 8)

Oni komparu la tutan sekcion „La burĝa socio” (p. 8-9), kiu estas konceptita laŭ la bazaj trajtoj de la hegela jurfilozofio. La burĝa socio en sia opozicio al la politika ŝtato estas agnoskata kiel necesa, ĉar la politika ŝtato estas agnoskata kiel necesa.

La *politika* emancipiĝo estas ja granda progreso, kvankam ĝi ne estas la lasta formo de la homa emancipiĝo entute, sed ĝi estas la lasta formo de la homa emancipiĝo *ene de* la ĝisnuna mondordo. Kompreneble: ni parolas ĉi tie pri reala, pri praktika emancipiĝo.

La homo emancipiĝas *politike* el la religio, per tio ke li ekziligas ĝin el la publika juro en la privatan juron. Ĝi jam ne estas la spirito de la ŝtato, kie la homo – kvankam en limigita maniero, sub specifa formo kaj en aparta sfero – kondutas kiel speciulo, en komuneco kun aliaj homoj, ĝi fariĝis la spirito de la *burĝa socio*, la sfero de egoismo, de la *milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj*. Ĝi jam ne estas la esenco de la *komuneco*, sed la esenco de la *malsameco*. Ĝi fariĝis esprimo de la *disiĝo* de la homo disde sia *komunumo*, disde si kaj disde la ceteraj homoj – kio ĝi estis *origine*. Ĝi estas jam nur la abstrakta konfeso de la aparta inverseco, de la *privata kaprico*, de la arbitreco. La senfina disspliteco de la religio en Nordameriko ekz-e donas al ĝi jam *ekstere* la formon de pure individua afero. Ĝi falis inter la nombron de privataj interesoj kaj estis ekzilita el la komunumo kiel komunumo. Sed oni ne trompiĝu pri la limo de la politika emancipiĝo. La fendiĝo de la homo en la *publikan* kaj la *privatan homon*, la *delokado* de la religio el la ŝtato en la burĝan socion, tio ne estas ŝtupo, sed la perfektigi de la politika emancipiĝo, kiu do nek forigas la *realan* religiecon de la homo nek strebas forigi ĝin.

La *disigo* de la homo en la judon kaj en la civitanon, en la protestanton kaj en la civitanon, en la religian homon kaj en la civitanon, tiu disigo ne estas mensogo kontraŭ la civitaneco, ĝi ne estas ĉirkaŭiro de la politika emancipiĝo, ĝi *estas la politika emancipiĝo mem*, ĝi estas la *politika* maniero emancipiĝi el la religio. Tamen: En epokoj, kiam la politika ŝtato kiel tia naskiĝas perforte el la burĝa socio, kiam la homa memliberigo en la formo de la politika memliberigo strebas plenumiĝi, la ŝtato povas kaj devas plu iri ĝis la *nuligo*¹³ *de la religio*, ĝis la neniigo de la religio, sed nur tiel, kiel ĝi plu iras al forigo de la privata proprieto, al la maksimumo, al la konfiskado, al la progresiva imposto, kiel ĝi plu iras al la nuligo de la vivo, al la *gilotino*. En la momentoj kiam la ŝtato aparte konsciiĝas pri si mem, la politika vivo provas sufoki ĝian premison, la burĝan socion kaj ties elementojn kaj konsistigi sin kiel la realan, senkontraŭdiran specian vivon de la homo. Ĝi povas tion tamen nur per *perforta* kontraŭdiro al siaj propraj vivkondiĉoj, nur per tio ke ĝi deklaras la revolucion *konstanta*, kaj la politika dramo finiĝas pro tio same necese per restarigo de la religio, de la privata proprieto, de ĉiuj elementoj de la burĝa socio, kiel la milito ĉesas per la paco.

Krome, ne la tiel nomata *kristana* ŝtato, kiu konfesas la kristanecon sia bazo, sia ŝtata religio kaj pro tio kondukas eksklude al aliaj religioj, estas la perfekta kristana ŝtato, sed la *ateisma* ŝtato, la *demokratia* ŝtato, la ŝtato kiu ekzilas la religion al la ceteraj elementoj de la burĝa socio. La ŝtato, kiu estas ankoraŭ teologo, kiu ankoraŭ oficiale konfesas la kredon de kristanismo, kiu ankoraŭ ne kuraĝas proklami sin kiel ŝtato, tiu ŝtato ankoraŭ ne sukcesis esprimi en *sekulara*, *homa* formo, en sia *realeco* kiel ŝtato, la *homan* bazon, kies transcenda esprimo estas la kristanismo. La tiel nomata kristana ŝtato estas simple nur la *neŝtato*, ĉar ne la kristanismo kiel religio, sed nur la *homa fono* de la

13 Originale: *Aufhebung*: aŭfhebo. -vl

kristana religio povas realiĝi en vere homajn kreaĵojn.

La tiel nomata kristana ŝtato estas la kristana neado de la ŝtato, sed neniel la ŝtata realigo de la kristaneco. La ŝtato, kiu konfesas la kristanecon ankoraŭ en la formo de la religio, ankoraŭ ne konfesas ĝin en la formo de ŝtato, ĉar ĝi rilatas al la religio ankoraŭ religie, t.e., ĝi ne estas la vera realigo de la homa bazo de la religio, ĉar ĝi referencas ankoraŭ la *malrealecon*, la *imagitan* formon de tiu homa kerno. La tiel nomata kristana ŝtato estas la *malperfekta* ŝtato, kaj la kristana religio estas por ĝi *kompletigo* kaj *sanktigo* de ĝia malperfekteco. Pro tio, la religio fariĝas por ĝi nepre *rimedo*, kaj ĝi estas la ŝtato de *hipokriteco*. Estas granda diferenco, ĉu la *perfekta* ŝtato, pro la manko, kiu troviĝas en la ĝenerala naturo de la ŝtato, nombras la religion inter siaj *premisoj*, aŭ ĉu la *neperfekta* ŝtato pro la manko, kiu troviĝas en ĝia *aparta ekzistado*, kiel mankhava ŝtato, deklaras la religion sia *bazo*. En la lasta kazo la religio fariĝas *malperfekta politiko*. En la unua kazo la malperfekteco eĉ de la perfekta *politiko* montriĝas en la religio. La tiel nomata kristana ŝtato bezonas la kristanan religion por perfektigi *kiel ŝtato*. La demokratia ŝtato, la vera ŝtato, ne bezonas religion por sia politika perfektigo. Male, ĝi povas abstrakti la religion, ĉar en ĝi la homa bazo de la religio estas realigita en sekulara maniero. La tiel nomata kristana ŝtato rilatas, male, al la religio politike kaj al la politiko religie. Se ĝi malaltigas la ŝtatajn formojn al ŝajno, ĝi same malaltigas la religion al ŝajno.

Por ilustrati tiun kontraŭecon, ni rigardu la konstruaĵon kiun Bauer donas al ni de la kristana ŝtato, konstruaĵon, estiĝintan el la esplorado de la kristana-ĝermana ŝtato.

„Oni lastatempe”, diras Bauer, „por pruvi la *maleblon* aŭ *neekziston* de kristana ŝtato, plurfoje atentigis pri tiuj eldiroj en la evangelio¹⁴, al kiuj la [nuna] ŝtato *ne nur ne* konformiĝas, sed

14 Ĉe Bauer: la evangelioj.

Karlo Markso: Pri la juda demando

eĉ ne povas konformiĝi, se ĝi ne volas [kiel ŝtato] komplete dissolviĝi. „Sed tiom ne facilas la afero. Kion do postulas tiuj evangeliaj eldiroj? La supernaturan abnegacion, la submetiĝon sub la aŭtoritato de la revelacio, la deturniĝon for de la ŝtato, la abolon de la sekularaj kondiĉoj. Nu, ĉion ĉi la kristana ŝtato postulas kaj faras. Ĝi alproprigis al si la *spiriton de la evangelio*, kaj se ĝi ne redonas ĝin per la samaj literoj, per kiuj la evangelio esprimas ĝin, tio okazas ĉar ĝi esprimas tiun spiriton en ŝtataj formoj, do en formoj, kiuj estas ja pruntitaj el la ŝtata sistemo de tiu ĉi mondo, sed en la religia renaskiĝo, kiun ili devas sperti, estas reduktitaj al nura ŝajno. Oni deturniĝas for de la ŝtato, kaj oni uzas tiun deturniĝon por realigi la formojn de la ŝtato, la formojn politikajn.” (p. 55)

Bauer poste daŭrigas, ke la popolo de la kristana ŝtato estas nur nepopolo, jam ne havas propran volon, sed posedas sian veran ekziston en la ĉefo, al kiu ĝi estas submetita, sed kiu estas al ĝi laŭ sia origino kaj laŭ sia naturo fremda, t.e. donita de Dio kaj venis al ĝi sen propra ago, ke la leĝoj de tiu popolo ne estas lia verko, sed pozitivaj revelacioj, ke ĝia ĉefo bezonas privilegiitajn perantojn en siaj rilatoj kun la vera popolo, kun la amaso, ke la amaso mem estas diserigita en multajn apartajn rondojn, kiujn la hazardo estigas kaj determinas, kiuj distingiĝas laŭ siaj interesoj, apartaj pasioj kaj antaŭjuĝoj kaj kiuj ricevas kiel privilegion la permeson izoliĝi disde la aliaj, ktp (p. 56)

Sed Bauer diras mem:

„La politiko, se ĝi estu nenio alia ol religio, ne rajtas esti politiko, same kiel la purigado de la kuirpotoj, se ĝi konsiderendas kiel religia afero, devas ne esti konsiderata kiel ekonomia afero.” (p. 108)

Tamen en la kristana-ĝermana ŝtato la religio estas „ekonomia afero”, kiel la „ekonomia afero” estas religio. En la kristana-ĝermana ŝtato la potenco de la religio estas la religio de la potenco.

La disigo de la „spirito de la evangelio” disde la „litero

de la evangelio” estas *kontraŭreligia* ago. La ŝtato, kiu paroligas la evangelion en la literoj de la politiko, en aliaj ol la literoj de la sankta spirito, faras sakrilegion, se ne antaŭ homaj okuloj, tiam ja antaŭ siaj propraj religiaj okuloj. Al la ŝtato, kiu konfesas la kristanecon kiel sian plej altan normon, kiu konfesas la *Biblion* kiel sian *carton*, oni devas kontraŭmeti la *vortojn* de la sankta skribo, ĉar la skribo estas sankta ĝis en la vorto. Tiu ŝtato same kiel la *homa feĉo*, sur kiu ĝi baziĝas, troviĝas implikita en dolora, el la starpunkto de la religia konscio nesuperebla kontraŭdiro, se oni resendas ĝin al tiuj eldiroj de la evangelio, al kiuj ĝi „ne nur ne konformiĝas, sed al kiuj ĝi *eĉ ne povas konformiĝi, se ĝi ne volas kiel ŝtato komplete dissolviĝi*”. Kaj kial ĝi ne volas komplete dissolviĝi? Ĝi mem povas pri tio respondi nek al si mem nek al iuj aliaj. Antaŭ ĝia *propra konscio* la oficiala kristana ŝtato estas *devo*, kies realigo estas neatingebla, kiu scias konstati la *realecon* de sia ekzistado nur per mensogoj antaŭ si mem kaj kiu pro tio restas ĉiam objekto de dubo, nefidinda, problemeca objekto. La kritiko do plene pravas, kiam ĝi trudas al la ŝtato, kiu apogas sin sur la Biblio, la kompletan konfuziĝon de la konscio, en kiu ĝi mem jam ne scias, ĉu ĝi estas *iluzio* aŭ *realajo*, en kiu la fieco de ĝiaj sekularaj celoj, al kiuj la religio servas kiel vualo, implikiĝas en nesolveblan konflikton kun la honesteco de sia *religia* konscio, al kiu la religio aperas kiel celo de la mondo. Tiu ŝtato povas elsaviĝi el sia interna turmento nur se ĝi fariĝas la ĝendarmo de la katolika eklezio. Fronte al tiu, kiu deklaras la sekularan potencon sia servanta korpo, la ŝtato estas senpova, senpova la sekulara potenco kiu asertas esti la dominado de la religia spirito.

En la tiel nomata kristana ŝtato validas ja la *fremdiĝo*, sed ne la homo. La sola homo, kiu validas, estas la reĝo, estaĵo specife distingita disde la ceteraj homoj, ĉe tio mem ankoraŭ religia estaĵo, rekte ligita kun la ĉielo, kun Dio. La rilatoj, kiuj regas tie, estas ankoraŭ *kredaj* rilatoj. La religia

spirito estas do ankoraŭ ne vere sekularigita.

Sed la religia spirito eĉ ne povas esti vere sekularigita, ĉar kio estas ĝi mem ol la *nesekulara* formo de evoluŝtupo de la homa spirito? La religia spirito povas esti sekularigita nur se la evoluŝtupo de la homa spirito, kies religia esprimo ĝi estas, elpaŝas en sia *sekulara* formo kaj konstituciigās. Tio okazas en la *demokratia* ŝtato. Ne la kristanismo, sed la homa bazo de la kristanismo estas la bazo de tiu ŝtato. La religio restas la ideala, nesekulara konscio de ĝiaj membroj, ĉar ĝi estas la ideala formo de la *homa evoluŝtupo*, kiu en ĝi realiĝas.

La membroj de la politika ŝtato estas religiaj per la duismo inter la individua kaj la specia vivo, inter la vivo de la burĝa socio kaj la politika vivo; religiaj ili estas per tio ke la homo rilatas al la ŝtata vivo – kiu estas por lia reala individueco transmonda – kiel al sia vera vivo; ili estas religiaj, en la senco ke la religio estas ĉi tie la spirito de la burĝa socio, la esprimo de disigo kaj de la fremdigo de la homo disde la homo. La politika demokratio estas kristana, per tio ke en ĝi la homo estas konsiderata ne nur homo, sed ke ĉiu homo estas konsiderata *suverena*, plej alta estaĵo, sed la homo en sia senkultura, nesocia formo, la homo en sia hazarda ekzistado, la homo ordinara, la homo koruptita de la tuta organizo de nia socio, perdita por si mem, fremdigita, donita sub la regadon de malhomaj kondiĉoj kaj elementoj, unuvorte, la homo kiu ankoraŭ ne estas reala specia estaĵo. Sed la fantaziaĵo, la revo, la postulato de la kristanismo, la suvereneco de la homo – kvankam kiel fremda estaĵo distingita de la reala homo – estas en la demokratio palpebla realaĵo, nuntempa, sekulara maksimumo.

La religia kaj teologia konscio mem konsideras sin en la perfektigita demokratio des pli religie, des pli teologie, ĉar ĝi estas ŝajne sen politika signifo, sen sekularaj celoj, afero de la mondfuĝa sento, esprimo de la mensa bariteco, la

produkto de la arbitreco kaj de la fantazio, ĉar ĝi estas vere transmonda vivo. La kristanismo atingas ĉi tie la *praktikan* esprimon de sia universalreligia signifo, per tio ke la plej diversaj mondperceptoj en la formo de kristanismo grupiĝas unu apud la alia, eĉ pli per tio ke ĝi postulas de la aliaj eĉ ne la kristanecon, sed jam nur la religion entute, ian ajn religion (komparu la cititan verkon de Beaumont). La religia konscio ĝuas la riĉecon de la religia kontraŭeco kaj de la religia varieco.

Ni montris do: La politika emancipiĝo el la religio lasas la religion plu ekzisti, kvankam ne privilegiitan religion. La kontraŭdiro, en kiu la adeptoj de iu aparta religio troviĝas kun sia civitaneco, estas nur *parto* de la ĝenerale *sekulara kontraŭdiro inter la politika ŝtato kaj la burĝa socio*. La perfektigo de la kristana ŝtato estas la ŝtato, kiu konfesas sin kiel ŝtaton kaj abstraktas la religion de siaj membroj. La emancipiĝo de la ŝtato el la religio ne estas la emancipiĝo de la reala homo el la religio.

Do, ni ne diras kun Bauer al la judoj: Vi ne povas politike emancipiĝi sen radikale emancipiĝi el la judismo. Male, ni diras al ili: Ĉar vi povas politike emancipiĝi, sen forlasi komplete kaj senkontraŭdire la judismon, tial la *politika emancipiĝo* mem ne estas la *homa emancipiĝo*. Se vi judoj volas politike emancipiĝi sen emancipiĝi home, tiam la malperfekteco kaj la kontraŭdiro kuŝas ne nur en vi, ĝi kuŝas en la *esenco* kaj la *kategorio* de la politika emancipiĝo. Se vi estas embarasitaj de tiu kategorio, tiam vi dividas ĝeneralan embarason. Kiel la ŝtato *evangelizas*, kiam ĝi, kvankam ŝtato, kondutas kristane al la judoj, tiel la judo *politikigas*, kiam li, kvankam judo, postulas civitanajn rajtojn.

Sed se la homo, kvankam judo, povas politike emancipiĝi, ricevi civitanajn rajtojn, ĉu li povas postuli kaj ricevi la tiel nomatajn homrajtojn? Bauer neas tion.

Karlo Markso: Pri la juda demando

„La demando, ĉu la judo kiel tia, t.e. la judo, kiu mem konfesas ke li estas pro sia vera naturo devigata vivi eterne disde la aliaj, estas kapabla ricevi la *ĝeneralajn homrajtojn* kaj atribui ilin al la aliaj.”

„La ideo de la homrajtoj malkovriĝis por la kristana mondo nur en la lasta jarcento. Ĝi ne estas ennaskita al la homo, ĝi estas nur konkerata en la batalo kontraŭ la historiaj tradicioj, en kiuj la homo estis ĝis nun edukata. Do, la homrajtoj ne estas donaco de la naturo, ne estas doto de la ĝisnuna historio, sed la prezo de la batalo kontraŭ la hazardo de la deveno kaj kontraŭ la privilegioj, kiujn la historio ĝis nun heredigis de generacio al generacio. Ili estas la rezultoj de la kleriĝo, kaj nur tiu povas posedi ilin, kiu akiris ilin per siaj meritoj.”

„Ĉu la judo do povas vere ekposedi ilin? Tiom longe kiom li estas judo, la limigita karaktero, kiu faras lin judo, nepre venkos la homan karakteron, kiu devus ligi lin kiel homon kun homoj, kaj ĝi apartigos lin disde la nejudoj. Li deklaras per tiu apartiĝo, ke la limigita karaktero, kiu faras lin judo, estas lia plej alta karaktero, antaŭ kiu la karaktero de la homo devas cedi.”

„En la sama maniero la kristano kiel kristano ne povas atribui homrajtojn.” (p. 19, 20)

La homo devas, laŭ Bauer, foroferi la „*privilegion de la kredo*” por povi akcepti la ĝeneralajn homrajtojn. Ni rigardu por momento la tiel nomatajn homrajtojn, kaj pli precize la homrajtojn en ilia aŭtenta formo, en la formo kiun ili posedas ĉe iliaj *malkovrintoj*, la nordamerikanoj kaj francoj! Parte tiuj homrajtoj estas *politikaj* rajtoj, uzataj nur en komuneco kun aliaj. La *partopreno* en la *komunumo*, kaj pli precize en la *politika* komunumo, en la *ŝtata* komunumo, estas ilia enhavo. Ili troviĝas en la kategorio de la politika libereco, en la kategorio de la civitanaj rajtoj, kiuj, kiel ni vidis, tute ne premisas la senkontraŭdiran kaj pozitivan nuligon de la religio, do ekz-e de la judismo. Sed restas la alia parto de al homrajtoj, la *droits de l’homme* [homrajtoj], en la mezuro laŭ kiu ili diferencas de la *droits du citoyen*

[civitanaj rajtoj].

En ilia vico troviĝas la libereco je konscienco, la rajto praktiki ian ajn kulton. La *privilegio de kredo* estas eksplacite agnoskata, aŭ kiel *homrajto* aŭ kiel konsekvenco de homrajto, de la libereco.

Déclaration des droits de l'homme et du citoyen 1791, article 10. „Nul ne doit être inquiété pour ses opinions même religieuses.” [Deklaro de la hom- kaj civitan-rajtoj 1791, artikolo 10: „Neniu estu ĝenata pro siaj konvinkoj, eĉ religiaj.”] En la titolo 1 de la konstitucio de 1791 oni garantias kiel homrajton: „La liberté à tout homme d'exercer le *culte religieux* au quel il est attaché.” [„La liberecon por ĉiu praktiki la *religion kulton*, kies adepto li estas.”]

Déclaration des droits de l'homme, etc. 1793, nombras inter la homrajtoj, artikolo 7: „Le libre exercice des cultes.” [„La libera praktikado de la kultoj”] Jes, koncerne la rajton publikigi siajn pensojn kaj opiniojn, kunveni, praktiki sian kulton, la teksto diras eĉ: „La nécessité d'énoncer ces *droits* suppose ou la présence ou le souvenir récent du despotisme.” [„La neceso proklami tiujn *rajtojn* premias aŭ la ekziston aŭ la freŝan memoron de la despotismo”] Oni komparu la konstitucion de 1795, titre XIV, article 354.

Constitution de Pensylvanie, article 9, § 3: „Tous les hommes ont reçu de la nature le droit imprescriptible d'adorer le Tout-Puissant selon les inspirations de leur conscience, et nul ne peut légalement être contraint de suivre, instituer ou soutenir contre son gré aucun culte ou ministère religieux. Nulle autorité humaine ne peut, dans aucun cas, intervenir dans les questions de conscience et contrôler les pouvoirs de l'âme.”

[Konstitucio de Pensilvanio, artikolo 9, § 3: „Ĉiuj homoj ricevis de la naturo la senpreskriptan rajton, laŭ la inspiroj de sia konscienco, adori la Ĉiopovulon, kaj neniu povas esti leĝe devigata sekvi, enkonduki aŭ subteni kontraŭ sia volo ian ajn kulton aŭ diservon. Neniaokaze ia ajn homa povo rajtas interveni en konsciencajn demandojn kaj kontroli la fortojn de la animo.”]

Constitution de New-Hampshire, article 5 et 6: „Au nombre des

Karlo Markso: Pri la juda demando

droits naturels, quelques-uns sont inaliénables de leur nature, parce que rien n'en peut être l'équivalent. De ce nombre sont les *droits* de conscience."

[Konstitucio de Nov-Hampŝiro, artikoloj 5 kaj 6: „Inter la naturaj rajtoj estas kelkaj, kiuj laŭ sia naturo estas necedeblaj, ĉar ne ekzistas ekvivalentoj. Al tiuj apartenas la *rajtoj* de konscienco.”] (Beaumont, l.c., p. 213, 214)

La neakordigeblo de la religio kun la homrajtoj tute ne troviĝas en la nocio de la homrajtoj, pro tio la *rajto esti religia*, esti ajne religia, praktiki la kulton de sia aparta religio, estas menciata eksplicite inter la homrajtoj: La *privilegio de la kredo* estas *ĝenerala homrajto*.

La *droits de l'homme*, la homrajtoj, estas kiel tiaj distingitaj disde la *droits du citoyen*, la civitanrajtoj. Kiu estas tiu *homo* distingita disde la *civitano*? Neniu alia ol la *membro de la burĝa socio*. Kial la membro de la burĝa socio estas nomata „homo”, homo ĝenerala, kial liaj rajtoj estas nomataj *homrajtoj*? El kio ni klarigas tiun faktan? El la rilato de la politika ŝtato al la burĝa socio, el la esenco de la politika emancipiĝo.

Antaŭ ĉio ni konstatas la faktan, ke la tiel nomataj *homrajtoj*, la *droits de l'homme* en sia diferenco disde la *civitanrajtoj*, estas nenio alia ol la rajtoj de la membro de la burĝa socio, do de la egoisma homo, de la homo disigita disde la komunumo. Ni paroligu la plej radikalan konstitucion, la konstitucion de 1793:

Déclaration des droits de l'homme et du citoyen.

Article 2. „Ces droits etc. (les droits naturels et imprescriptibles) sont: l'égalité, la liberté, la sûreté, la propriété.

[*Deklaro de la hom- kaj civitan-rajtoj.*

Artikolo 2. „Tiuaj rajtoj ktp (la naturaj kaj nepreskripteblaj rajtoj) estas: „*egaleco, libereco, sekureco, proprieto.*”]

En kio konsistas la *liberté* [libereco]?

Article 6. „La liberté est le pouvoir qui appartient à l'homme de faire tout ce qui ne nuit pas aux droits d'autrui”, aŭ laŭ la Deklaro de la homrajtoj de 1791: „La liberté consiste à pouvoir faire tout ce qui ne nuit pas à autrui.”

[Artikolo 6. „Libereco estas la rajto de la homo fari ĉion kio ne malutilas al aliiĝes rajtoj”, aŭ, laŭ la Deklaro de la homrajtoj de 1791: „La libereco konsistas en tio, rajti fari ĉion kio ne malutilas al aliuloj.”]

La libereco estas do la rajto fari ĉion kio ne malutilas al aliuloj. La limo, en kiu ĉiu rajtas moviĝi *ne malutile* rilate la aliajn, estas determinita de la leĝo, same kiel la limo inter du kampoj estas markita per fosto. Temas pri la libereco de la homo kiel izolita, enmemiĝinta monado. Kial la judo laŭ Bauer ne povas ricevi la homrajtojn?

„Tiom longe kiom li estas judo, la homan karakteron, kiu devus ligi lin kiel homon kun homoj, nepre venkos la limigita karaktero, kiu faras lin judo, kaj apartigos lin disde la nejudoj.”

Sed la homrajto je libereco ne baziĝas sur la ligo de la homo kun la homo, sed male sur la apartiĝo de la homo disde la homo. Ĝi estas la *rajto* de tiu apartiĝo, la rajto de la *limigita*, al si limigita individuo.

La praktika apliko de la homrajto je libereco estas la homrajto je *privata proprieto*.

En kio konsistas la homrajto je privata proprieto?

Article 16. (Constitution de 1793): „Le droit de *propriété* est celui qui appartient à tout citoyen de jouir et de disposer à son gré de ses biens, de ses revenus, du fruit de son travail et de son industrie.”

[Artikolo 16. (Konstitucio de 1793): „La rajto je proprieto estas la rajto de ĉiu civitano laŭplaĉe ĝui kaj disponi pri siaj havaĵoj, siaj enspezoj, pri la frukto de sia laboro kaj de sia diligentero.”]

La homrajto je privata proprieto estas do la rajto laŭplaĉe (à son gré), sen rilato al aliaj homoj, sendepende de la

socio, ĝui sian havaĵon kaj disponi pri ĝi, la rajto je egoismo. Tiu individua libereco, kun sia aplikado, kiu formas la bazon de la burĝa socio. Ĝi vidigas al ĉiu homo en la alia homo ne la realigon, sed male la limon de sia libereco. Sed ĝi proklamas antaŭ ĉio la homrajton

„laŭplaĉe ĝui kaj disponi pri siaj havaĵoj, siaj enspezoj, pri la frukto de sia laboro kaj de sia diligenteco.”

Restas ankoraŭ la aliaj homrajtoj, la égalité [egaleco] kaj la sûreté [sekureco].

La égalité [egaleco], ĉi tie en sia nepolitika signifo, estas nenio alia ol la egaleco de la supre priskribita liberté, nome: ke ĉiu homo estas konsiderata egale kiel tia enmemiĝinta monado. La konstitucio de 1795 difinas la nocion de tiu egaleco, laŭ ĝia graveco, jene:

Article 3. (Constitution de 1795): „L'égalité consiste en ce que la loi est la même pour tous, soit qu'elle protège, soit qu'elle punisse.”

[Artikolo 3. (Konstitucio de 1795): „La egaleco konsistas en tio ke la sama leĝo validas por ĉiuj, egale ĉu ĝi protektas aŭ punas.”]

Kaj la sûreté [sekureco]?

Article 8. (Constitution de 1793): „La sûreté consiste dans la protection accordée par la société à chacun de ses membres pour la conservation de sa personne, de ses droits et de ses propriétés.”

[Artikolo 8. (Konstitucio de 1793): „La sekureco konsistas en la protekto, kiun la socio donas al ĉiu sia membro por la konservado de lia persono, de liaj rajtoj kaj de lia propio.”]

La sekureco estas la plej alta socia nocio de la burĝa socio, la nocio de la polico, ke la tuta socio ekzistas nur por garantii al ĉiu sia membro la konservadon de lia persono, de liaj rajtoj kaj de lia propio. Hegelo nomas tiusence la burĝan socion „la mizer- kaj racio-ŝtato”.

Per la nocio de sekureco la burĝa socio ne leviĝas super sian egoismon. La sekureco estas, male, la *certigo*¹⁵ de ĝia egoismo.

Neniu el la tiel nomataj homrajtoj do transiras la egoisman homon, trans la homon tian kia li estas kiel membro de la burĝa socio, nome la individuo retiriĝinta al si mem, al sia privata intereso kaj al sia privata arbitreco, kaj apartiĝinta disde la komuneco. Anstataŭ ke la homo estus en ili konceptita kiel specia estaĵo, aperas male la specia vivo mem, la socio, kiel kadro ekstera al la individuoj, kiel limigo de ilia origina sendependeco. La sola ligo, kiu kuntenas ilin, estas la naturneceso, la bezono kaj la privata intereso, la konservado de ilia propio kaj de ilia egoisma persono.

Estas ja enigme, ke popolo, kiu ĵus komencis liberiĝi, faligi ĉiujn barojn inter la diversaj membroj de la popolo, fondi politikan komunumon, ke tia popolo solene proklamas la rajton de la egoisma homo apartiĝinta disde la kunhomo kaj disde la komunumo (Déclaration de 1791), kaj eĉ ripetas tiun proklamon en momento, en kiu nur la plej herooa sindonemo povas savi la nacion kaj kiu estas do nepre postulata en momento en kiu la forofero de ĉiaj intereso de la burĝa socio devas esti sur la tagordo kaj la egoismo punata kiel krimo. (Déclaration des droits de l’homme etc. de 1793) Tiu fakto fariĝas eĉ pli enigma, kiam ni vidas ke la emancipistoj degradas la civitanekon, la politikan komunumon eĉ al nura rimedo por konservado de la tiel nomataj homrajtoj, ke ili do deklaras la civitanon servisto de la egoisma homo, degradas la sferon, en kiu la homo kondutas kiel komunuma estaĵo, sub la sferon en kiu li kondutas kiel parta estaĵo, kaj ke fine ne la homo kiel civitano, sed la homo kiel burĝo estas konsiderata la vera kaj aŭtenta homo.

„*Le but de toute association politique est la conservation des droits naturels et imprescriptibles de l’homme.*” (Déclaration

15 Originale: *Versicherung*, do: certigo, sed ankaŭ: asekuro. -vl

des droits etc. de 1791 article 2) „Le [367] *gouvernement* est institué pour garantir à l'homme la jouissance de ses droits naturels et imprescriptibles.” (Déclaration etc. de 1793 article 1)

[La celo de ĉia politika asocio estas la konservado de la naturaj kaj senpreskriptaj homrajtoj (Deklaro de la rajtoj ktp de 1791, artikolo 2) „La registaro estas starigita por garantii al la homo la ĝuadon de liaj naturaj kaj senpreskriptaj rajtoj.” (Deklaro ktp de 1793, artikolo 1)]

Do, eĉ en la momento de sia ankoraŭ junece freŝa kaj per la forto de la cirkonstancoj ekstremigita entuziasmo, la politika vivo deklaras sin nura *rimedo*, kies celo estas la vivo de la burĝa socio. Estas vere ke ĝia revolucia praktiko staras en evidenta kontraŭdiro kun sia teorio. Dum ekz-e la sekureco estas deklarata homrajto, la rompo de la korespond-sekreto estas publike metita sur la tagordon. Dum la „liberté indéfinie de la presse” [„nelimigita gazetara libereco”] (konstitucio de 1793, artikolo 122) estas garantiata kiel konsekvenco de la homrajto, de la individua libereco, la gazetara libereco estas komplete neniigita, ĉar „la liberté de presse ne doit pas être permise lorsqu'elle compromet la liberté publique” (Robespierre jeune, „Histoire parlementaire de la révolution française” par Buchez et Roux, T. 28, p. 159) [„... la gazetara libereco devas ne esti permesita, se ĝi endanĝerigas la publikan liberecon” (La juna Robespierre, „Parlamenta historio de la franca revolucio” de Bouchez kaj Roux, vol. 28, p. 159)], tio do signifas: La homrajto je libereco ĉesas esti rajto, ekde kiam ĝi konfliktiĝas kun la *politika* vivo, dum laŭ la teorio la politika vivo estas nur la garantio de la homrajtoj, de la rajtoj de la individua homo, kiu do estas forlasenda, ekde kiam ĝi kontraŭdiras sian *celon*, tiujn homrajtojn. Sed la praktiko estas nur la escepto, kaj la teorio estas la regulo. Sed se oni volas konsideri la revolucian praktikon mem kiel la ĝustan pozicion de la rilato, tiam restas tamen la enigmo solvenda, kial en la konscio de la politikaj emancipistoj la rilato estas inversigita kaj la

celo aperas kiel rimedo, la rimedo kiel celo. Tiu optika trompo de ilia konscio estus daŭre la sama enigmo, kvankam tiam psihologia, teoria enigmo.

La enigmo solviĝas simple.

La politika emancipiĝo estas samtempe la *dissolvo* de la malnova socio, sur kiu baziĝas la ŝtato, la reganta potenco, fremdigita al la popolo. La politika revolucio estas la revolucio de la burĝa socio. Kiu estis la karaktero de la malnova socio? Unu vorto karakterizas ĝin. La *feŭdeco*. La malnova burĝa socio havis *rekte politikan* karakteron, t.e. la elementoj de la burĝa vivo, kiel ekz-e la posedo aŭ la familio aŭ la maniero de la laboro, estis en la formo de grundsinjoreco, de la socia stato kaj de la korporacio levitaj al elementoj de la ŝtata vivo. En tiu formo ili determinis la rilaton de la unuopa individuo al la *ŝtata tutaĵo*, do lian politikan situacion, do lian situacion per kiu li estis ekskludita kaj disigita disde la aliaj elementoj de la socio. Ĉar tiu organizado de la popola vivo ne levis la posedon aŭ la laboron al sociaj elementoj, sed male perfektigis ilian *disiĝon* disde la ŝtata tutaĵo kaj tiel faris ilin *apartaj* socioj en la socio. Tiel la vivfunkcioj kaj vivkondiĉoj de la burĝa socio estis tamen daŭre politikaj, kvankam politikaj en la senco de la feŭdeco, do ili ekskludis la individuon el la ŝtata tutaĵo, ili transformis la *apartan* rilaton, kiun lia korporacio havis kun la ŝtata tutaĵo, en lian propran ĝeneralan rilaton al la popola vivo, kiel ili transformis lian determinitan burĝan agadon kaj situacion en lian ĝeneralajn agadon kaj situacion. Kiel konsekvenco de tiu organizado aperas nepre la ŝtata unueco, same kiel la konscio, la volo kaj la agado de la ŝtata unueco, la ĝenerala ŝtatpotenco, ankaŭ kiel *aparta* afero de suverena reganto, disigita de la popolo kaj de liaj servantoj.

La politika revolucio, kiu faligis tiun potencon de suverena reganto kaj levis la ŝtatajn aferojn al popolaj aferoj, kiu konsistigis la politikan ŝtaton kiel *ĝeneralan* aferon, do kiel

realan ŝtaton, disbatis nepre ĉiujn sociajn statojn, korporaciojn, gildojn, privilegiojn, kiuj estis same multaj esprimoj de disigo de la popolo disde ĝia komunumo. La politika revolucio per tio *nuligis la politikan karakteron de la burĝa socio*. Ĝi disbatis la burĝan socion en ties simplajn erojn, unuflanke en la *individuojn*, aliflanke en la *materiajn kaj spiritajn* elementojn, kiuj konsistigas la vivenhavon, la burĝan situacion, de tiuj individuoj. Ĝi senkatenigis la politikan spiriton, kiu estis diserigita, dividita, perdita kvazaŭ en diversaj sakstratoj de la feŭda socio; ĝi kolektis ĝin el tiu diseco, ĝi liberigis ĝin el ĝia miksiĝo kun la burĝa vivo kaj konsistigis ĝin kiel la sferon de la komunumo, de la *ĝenerala* popolafero en ideala sendependeco disde tiuj *apartaj* elementoj de la burĝa vivo. La *determinita* vivagado kaj la determinita vivsituacio malaltiĝis al nur individua graveco. Ili jam ne konsistigis la ĝeneralan rilaton de la individuo al la ŝtata tutaĵo. La publika afero kiel tia fariĝis, male, la ĝenerala afero de ĉiu individuo kaj la politika funkcio ties ĝenerala funkcio.

Sed la perfektigo de la idealismo de la ŝtato estis samtempe la perfektigo de la materiismo de la burĝa socio. La deskuado de la politika jugo estis samtempe la deskuado de la katenoj kiuj estis ligintaj la egoisman spiriton de la burĝa socio. La politika emancipiĝo estis samtempe la emancipiĝo de la burĝa socio el la politiko, kaj eĉ el la *ŝajno* de ĝenerala enhavo.

La feŭda socio estis dissolvita en sia bazo, en la homo, sed en tia homo kiu vere estis ĝia bazo, en la *egoisman* homon.

Tiu *homo*, la membro de la burĝa socio, estas nun la bazo, la premiso de la *politika* ŝtato. Li estas de ĝi agnoskita en la homrajtoj.

La libereco de la egoisma homo kaj la agnosko de tiu libereco estas tamen la agnosko de la *senbrida* moviĝo de la

spiritaj kaj materiaj elementoj, kiuj formas lian vivenhavon.

La homo estis do ne liberigita el la religio, li ricevis la religi-liberecon. Li ne estis liberigita el la proprieto. Li ricevis la liberecon je proprieto. Li ne estis liberigita el la egoismo de la industrio, li ricevis la liberecon je industrio.

La *konsistigo de la politika ŝtato* kaj la dissolvado de la burĝa socio en la sendependajn *individuojn* – kies rilatoj estas reguligataj de la juro, same kiel la rilatoj de la stataj kaj gildaj homoj estis la *privilegio* – okazas *en unu sama ago*. Sed la homo, tia kia li estas membro de la burĝa socio, la *nepolitika* homo, aperas nepre kiel la *natura* homo. La *homrajtoj* aperas kiel *naturaj rajtoj*, ĉar la *memkonscia agado* koncentriĝas sur la *politika ago*. La *egoisma* homo estas la *pasiva*, nur *donita* rezulto de la dissolvita socio, objekto de la *rekta certeco*, do *natura* objekto. La *politika revolucio* dissolvas la burĝan vivon en ĝiajn erojn, sen *revolucii* tiujn erojn mem kaj submeti ilin al la kritiko. Ĝi rilatas al la burĝa socio, al la mondo de la bezonoj, de la laboro, de la privataj interesoj, de la privata juro, kiel al la *bazo de sia ekzistado*, kiel al *premis*o kiu jam ne bezonas argumenton, pro tio kiel al sia *naturbazo*. Fine la homo, kiel membro de la burĝa socio, estas konsiderata la *vera* homo, la *homo* malsame ol la *civitano*, ĉar li estas la homo en sia sensa individua *plej proksima* ekzistado, dum la *politika* homo estas nur la abstrakta, artefarita homo, la homo kiel *alegoria*, *morala* persono. La reala homo estas agnoskata nur en la formo de la *egoisma individuo*, la *vera* homo nur en la formo de la *abstrakta civitano*.

La abstraktadon de la politika homo Rusoo ĝuste pri-skribas jene:

„Celui qui ose entreprendre d'instituer un peuple doit se sentir en état de *changer* pour ainsi dire la *nature humaine*, de *transformer* chaque individu, qui per lui-même est un tout parfait et solitaire, en partie d'un plus grand tout dont

cet individu reçoive en quelque sorte sa vie et son être, de substituer une *existence partielle morale* à l'existence physique et indépendante. Il faut qu'il ôte à *l'homme ses forces propres* pour lui en donner qui lui soient étrangères et dont il ne puisse faire usage sans le secours d'autrui." („Contrat Social", livre II, Londres 1782, p. 67.)

[„Tiu kiu kuraĝas doni al la popolo juran ordon, devas senti sin kapabla kvazaŭ *ŝanĝi la homan naturon*, transformi ĉiun individuon, kiu estas al si mem kaj sole por si perfekta tutaĵo, en la *parton* de pli granda tutaĵo, el kiu tiu individuo iel ricevas sian vivon kaj eston, anstataŭigi korp-an kaj sendependan ekzistadon per morala part-ekzistado. Li devas forpreni de la homo ties proprajn fortojn, por doni al li anstataŭe fremdajn, kiujn li povas uzi nur per helpo de aliuloj." („Socia traktato", libro II, Londono, 1782, p. 67)]

Ĉia emancipiĝo estas *atribuado* de la homa mondo, de la kondiĉoj, al la *homo mem*.

La politika emancipiĝo estas la reduktado de la homo, unuflanke al la membro de la burĝa socio, al la egoisma sendependa individuo, aliflanke al la *civitano*, al la morala persono.

Nur kiam la reala individua homo reprenas la abstraktan civitanon en si kaj, kiel individua homo en sia empiria vivo, en sia individua laboro, en siaj individuaj rilatoj, fariĝis *specia estaĵo*, nur kiam la homo rekonis kaj organizis siajn proprajn fortojn kiel *sociajn* fortojn kaj do jam ne disigas de si la socian forton sub la formo de la *politika* forto, nur tiam la homa emancipiĝo plenumiĝis.

II „La kapablo de la hodiaŭaj judoj kaj kristanoj emancipiĝi”.

De Bruno Bauer. („Einundzwanzig Bogen”, p. 56-71)

Sub tiu formo Bauer pritraktas la rilatojn de la juda kaj kristana religioj kaj iliajn rilatojn kun la kritiko. Ilia rilato al la kritiko estas ilia rilato kun „la kapablo fariĝi liberaj”.

Li konkludas:

„La kristano devas superpaŝi nur unu ŝtupon, nome sian religion, por forlasi la religion entute”, do por fariĝi libera, „la judo, male, devas rompi ne nur kun sia juda esenco, sed ankaŭ kun la disvolvado de la perfektigo de sia religio, kun disvolvado kiu restis al li fremda.” (p. 71)

Bauer transformas do ĉi tie la demandon de la juda emancipiĝo en pure religian demandon. La teologia skrupulo, per kiu demandiĝas kiu el ili povas pli esperi la eternan beatecon, la judo aŭ la kristano, ripetiĝas en la klerisma formo: kiu el la du estas *pli kapabla emancipiĝi*? La demando jam ne estas: Ĉu judismo aŭ kristanismo igas libera? sed inverse: Kio igas pli libera, la neado de la judismo aŭ la neado de la kristanismo?

„Se ili volas fariĝi liberaj, tiam la judoj devas ne ekkonfesi la kristanismon, sed la dissolvitan kristanismon, la dissolvitan religion entute, do la filozofion, la kritikon kaj ilian rezulton, la liberan homecon.” (p. 70)

Daŭre temas pri konfeso por la judo, sed jam ne pri la konfeso je kristanismo, sed je la dissolvita kristanismo. Bauer postulas de la judoj rompi kun la esenco de la kristana religio, ion kio, kiel li diras mem, ne devenas el la disvolvo de la juda esenco.

Post kiam Bauer ĉe la fino de la juda demando komprenis la judismon nur kiel la krudan religian kritikon de la kristanismo, do vidis en ĝi „nur” religian signifon, estis

antaŭvideble ke ankaŭ la emancipiĝo de la judoj transformiĝos en filozofian-teologian agon.

Bauer komprenas la *idealan* abstraktan esencon de la judo, lian *religion* kiel lian *tutan* esencon. Li konkludas do prave: „La judo donas al la homaro nenion, se li malestimas sian limigitan leĝon por si”, kiam li nuligas sian tutan judismon. (p. 65)

La rilato inter judoj kaj kristanoj fariĝas laŭ tio jena: la sola intereso de la kristano pri la emancipiĝo de la judo estas ĝenerale homa, *teoria* intereso. La judismo estas ofenda fakto por la religia okulo de la kristano. Ekde kiam lia okulo ĉesas esti religia, tiu fakto ĉesas esti ofenda. La emancipiĝo de la judo estas per si mem nenia tasko por la kristano.

La judo, male, por liberiĝi, devas fari ne nur sian propran laboron, sed samtempe la laboron de la kristano, la kritikon de la sinoptikistoj kaj de la „vivo de Jesuo” ktp.

„Ili vidu mem: ili determinas mem sian sorton; sed la historio ne lasas sin primoki” (p. 71)

Ni provu rompi la teologian version de la demando. La demando pri la emancipiĝkapablo de la judoj transformiĝas por ni en la demandon, kiu aparta socia elemento estas superenda por nuligi la judismon? Ĉar la emancipiĝkapablo de la hodiaŭa judo estas la rilato de la judismo al la emancipiĝo de la hodiaŭa mondo. Tiu rilato rezultas nepre el la aparta pozicio de la judismo en la hodiaŭa servutigita mondo.

Ni rigardu la realan profanan judon, ne la *judon de la sabatjudon*¹, kiel Bauer faras, sed la *ordinaran judon*.

1 Juda kredanto kiu respektas sian religian leĝon kaj laŭ tiu konsideras la sabaton sankta, simile al la kristana sanktigo de la dimanĉo, kaj do ekz-e ne laboras dum ĝi. -vl

II „La kapablo de la hodiaŭaj judoj kaj kristanoj emancipiĝi”.

Ni serĉu la sekreton de la judo ne en lia religio, sed ni serĉu la sekreton de la religio en la reala judo.

Kiu estas la profana bazo de la judismo? La praktika bezono, la *egoismo*.

Kiu estas la profana kulto de la judo? *Vendaĉismo*. Kiu estas lia profana dio? La *mono*.

Nu bone! La emancipiĝo el la *vendaĉismo* kaj el la *mono*, do el la praktika, reala judismo estus la mememancipiĝo de nia epoko.

Organizado de la socio, kiu nuligus la premison de la vendaĉismo, do la eblecon de la vendaĉismo, malebligus la judon. Lia religia konscio forvaporigu en la reala vivetoso de la socio. Aliflanke: se la judo ekkonas tiun sian *praktikan* esencon kiel vantano kaj laboras por ĝia nuligo, tiam li laboras, el sia ĝisnuna evoluo, por la *homa emancipiĝo* ĝenerale kaj turnas sin kontraŭ la *plej alta praktika* esprimo de la homa memfremdigo.

Ni ekkonas do en la judismo ĝeneralan *aktualan kontraŭ-socian* elementon, kiu per la historia evoluo, en kiu la judoj en tiu malbona rilato aktive partoprenis, estis portata al sia nuna kulmina alteco, sur kiu ĝi nepre dissolviĝos.

La *emancipiĝo de la judoj* estas, en sia lasta signifo, la emancipiĝo de la homaro el la *judismo*.

La judo jam emancipiĝis siamaniere.

„La judo, kiu en Vieno ekz-e estas nur tolerata, determinas per sia monpotenco la sorton de la tuta regno. La judo, kiu en la plej eta germana ŝtato povas esti senrajta, decidas pri la sorto de Eŭropo. Dum la korporacioj kaj gildoj restas fermitaj por la judo aŭ ankoraŭ ne estas favoraj, la aŭdaco de la industrio primokas la obstinon de la mezepokaj institucioj.” (B. Bauer, „Judenfrage”, p. 114)

Tio ne estas izolita fakto. La judo emancipiĝis en juda

maniero, ne nur per akiro de monpotenco, sed per tio ke per li kaj sen li la mono fariĝis monpotenco kaj la praktika juda spirito fariĝis la praktika spirito de la kristanaj popoloj. La judoj emancipiĝis en la sama mezuro en kiu la kristanoj judiĝis.

„La pia kaj politike libera loĝanto de Novanglio”, raportas ekze la kolonelo Hamilton, „estas ia Lakoono, kiu faras eĉ ne la plej etan klopodon por liberigi sin el la serpentoj, kiuj kunpremas lin. Mamono estas ilia idolo, ili adoras lin ne nur per siaj lipoj, sed per ĉiaj fortoj de sia korpo kaj menso. La Tero estas en iliaj okuloj nenio alia ol borso, kaj ili estas konvinkitaj ke ili havas ĉi-monde nenian alian destinton ol fariĝi pli riĉaj ol iliaj najbaroj. La vendaĉismo akaparis ĉiujn iliajn pensojn, kaj ili ne havas alian ripozon ol la ŝanĝon de objektoj. Kiam ili vojaĝas, ili portas kvazaŭ sian tombakaĵon aŭ kontoron sur la dorso kaj parolas pri nenio alia ol pri interezoj kaj profito. Kiam ili por momento perdas siajn aferojn el la vido, tiam nur por meti sian nazon en la aferojn de aliuloj.”

Jes, la praktika regado de la judismo super la kristana mondo atingis en Nordameriko la senambiguan, normalan esprimon ke la predikado de la evangelio mem, ke la kristana instru-ofico fariĝis komerca artiklo, kaj la bankrota komercisto okupiĝas pri la evangelio kiel la riĉiĝinta pastro en aferetoj.

„Tel que vous le voyez à la tête d'une congrégation respectable a commencé par être marchand; son commerce étant tombé, il s'est fait ministre; cet autre a débuté par le sacerdoce, mais dès qu'il a eu quelque somme d'argent à la disposition, il a bissé la chaire pour le négoce. Aux yeux d'un grand nombre, le ministère religieux est une véritable carrière industrielle.” (Beaumont, l. c., p. 185, 186.)

[Tiu, kiun vi vidas ĉe la pinto de respektata kongregacio, komencis kiel komercisto; ĉar lia komercio fiaskis, li fariĝis pastro; alia komencis per la pastra ofico, sed ekde kiam li disponis pri certa sumo da mono, li interŝanĝis la katedron kontraŭ la negoĉo. En la okuloj de granda plimulto la religia ofico estas efektive industria kariero.” (Beaumont, saml., p. 185, 186)]

II „La kapablo de la hodiaŭaj judoj kaj kristanoj emancipiĝi”.

Laŭ Bauer estas

„mensoga situacio, se oni en la teorio rifuzas al la judo la politikajn rajtojn, dum en la praktiko li posedas gigantan povon kaj se oni reduktas lian politikan influon *podetale*, li praktikas ĝin *pogrande*.” („Judenfrage”, p. 114)

La kontraŭdiro inter la praktika politika potenco de la judo kaj liaj politikaj rajtoj estas la kontraŭdiro inter politiko kaj monpotenco entute. Dum la unua staras ideale super la dua, ĝi fariĝis fakte ĝia servutulo.

La judismo konserviĝis *apud* la kristanismo, ne nur kiel religia kritiko de la kristanismo, ne nur kiel dubo pri la religia deveno de la kristanismo, sed same multe, ĉar la praktike juda spirito, ĉar la judismo konserviĝis en la kristana socio mem kaj akiris tie eĉ sian plej altan elformiĝon. La judo, kiu staras kiel aparta membro en la burĝa socio, estas nur aparta formo de la judismo de la burĝa socio

La judismo konserviĝis ne malgraŭ la historio, sed per la historio.

El siaj propraj intestoj la burĝa socio produktas konstante la judon.

Kio estis per si mem la bazo de la juda religio? La praktika bezono, la egoismo.

La monoteismo de la judo estas do en la realo la politeismo de la multaj bezonoj, politeismo, kiu faras ankaŭ la necesejon objekto de la dia leĝo. La *praktika bezono*, la *egoismo* estas la principo de la *burĝa socio* kaj aperas pura kiel tia, ekde kiam la burĝa socio komplete naskis el si la politikan ŝtaton. La dio de la *praktika bezono kaj de egoismo* estas la mono.

La dio estas la ĵaluza dio de Israelo, antaŭ kiu neniu alia dio rajtas ekzisti. La mono malaltigas ĉiujn diojn de la homoj – kaj transformas ilin en varon. La mono estas la

ĝenerala, por si mem konsistigita *valoro* de ĉiuj aĵoj. Pro tio ĝi prirabis la tutan mondon, la hommondon kiel la naturon, je ties aparta valoro. La mono estas la al la homo fremdiĝinta esenco de lia laboro kaj de lia ekzisto, kaj tiu fremda estaĵo dominas lin, kaj li adoras ĝin.

La dio de la judoj sekulariĝis, li fariĝis monddio. La trato estas la reala dio de la judo. Lia dio estas nur trato iluzia.

La ideo, kiun oni, sub la dominado de la privata proprieto kaj de la mono, faras al si pri la naturo, estas la reala malestimo, la praktika malaltigo de la naturo, kiu ja ekzistas en la juda religio, sed nur en la imago.

Tiusence Thoms Münzer deklaras neelteneba,

„ke ĉia kreitaĵo estas farita proprieto, la fiŝoj en la akvo, la birdoj en la aero, la kreskaĵo sur la tero – ankaŭ la kreitaĵo devas liberiĝi”.

Kio estas abstrakte entenata en la juda religio, la malestimo de la teorio, de la arto, de la historio, de la homo kiel memcelo, tio estas la reala kaj konscia starpunkto, la virto de la monhomo. Kaj eĉ la specia rilato mem, la rilato de viro kaj virino ktp, fariĝas komerca objekto! La virino estas komercata.

La *ĥimera* nacieco de la judoj estas la nacieco de la komercisto, entute de la monhomo.

La senfunda leĝo de la judo estas nur la religia karikaturo de la senfunda moraleco kaj de la juro entute, de la nur *formalaj* ritoj, per kiuj la mondo de egoismo ĉirkaŭas sin.

La juda jesuitismo, la sama praktika jesuitismo, kiun Bauer pruvas en la Talmudo, estas la rilato de la mondo de egoismo al la ĝin dominantaj leĝoj, kies ruza ĉirkaŭrado estas la ĉefa arto de tiu ĉi mondo.

Jes, la moviĝo de tiu ĉi mondo ene de siaj leĝoj estas

II „La kapablo de la hodiaŭaj judoj kaj kristanoj emancipiĝi”.

nepre konstanta nuligo² de la leĝo.

La judismo ne povis plu evolui kiel religio, teorie, ĉar la mondpercepto de la praktika bezono estas laŭ sia naturo limigita kaj kelkaj trajtoj sufiĉas por karakterizi ĝin.

La religio de la praktika bezono povis laŭ sia esenco trovi sian perfektigon ne en la teorio, sed nur en la *praktiko*, ĝuste ĉar ĝia vero estas la praktiko.

La judismo ne povis krei novan mondon, ĝi povis nur tiri la novajn mondkreaĵojn kaj mondrilatojn en la sferon de sia agado, ĉar la praktika bezono, kies racio estas la egoismo, kondutas pasive kaj ne konstante etendiĝas, sed *trovas* sin etendita kun la pluevoluado de la sociaj kondiĉoj.

La judismo atingas sian apogeon kun la perfektigo de la burĝa socio; sed la burĝa socio perfektigas nur en la *kristana* mondo. Nur sub la regado de la kristanismo, kiu *eksterigas* ĉiujn naciajn, naturajn, moralajn, teoriajn kondiĉojn de la homo, la burĝa socio povis komplete disiĝi disde la ŝtata vivo, disŝiri ĉiujn speciajn ligojn de la homo, anstataŭigi tiujn speciajn ligojn per la egoismo, la egoisma bezono, dissolvi la hommondon en mondon de atomecaj individuoj kiuj staras malamike unu kontraŭ la alia.

La kristanismo fontis el la judismo. Ĝi dissolvis sin en la judismon.

La Kristo estis dekomence la teoriumanta judo, la judo estas pro tio la praktika Kristo, kaj la praktika Kristo refariĝis judo.

La kristanismo nur ŝajne superis la realan judismon. Ĝi estis tro bone edukita, tro spiritualisma, por forigi la krudecon de la praktika bezono alie ol per la leviĝo en la bluan aeron.

2 Originale: *Aufhebung*, „aŭfhebo”. -vl

La kristanismo estas la sublimesa penso de la judismo, la judismo estas la vulgara apliko de la kristanismo, sed tiu aplikado povis ĝeneraliĝi nur post kiam la kristanismo kiel la perfekta religio, estis *teorie* finfarinta la memfremdiĝon de la homo disde si kaj disde la naturo.

Nur nun la judismo povis akiri ĝeneralan dominadon kaj fari la fremdigitan homon, la fremdigitan naturon, fremdigeblaj, vendeblaj objektoj elmetitaj al la servuto de la egoisma bezono, al la vendaĉismo.

La senposedigo estas la praktiko de la fremdigo.³ Kiel la homo, dum li restas en religia embaraso, scias konkretigi sian esencon nur per tio ke li faras ĝin fremda fantasta estaĵo, tiel li povas agi sub la regado de la egoisma bezono nur praktike, nur praktike produkti objektojn, per tio ke li metas siajn produktojn, kiel sian agadon, sub la regadon de fremda estaĵo kaj donas al ili la signifon de fremda estaĵo – de la mono.

La kristana egoismo je beateco transformiĝas en sia perfekta praktiko nepre en la korpan egoismon de la judo, la ĉiela bezono en la teran, la subjektivismo en la egoismon. Ni klarigas la persistemon de la judo ne el lia religio, sed male el la homa bazo de lia religio, la praktika bezono, la egoismo.

Ĉar la reala esenco de la judo ĝenerale realiĝis, sekulariĝis en la burĝa socio, tial la burĝa socio ne povis konvinki la judon pri la *malrealeco* de lia *religia* esenco, kiu estas ĝuste nur la ideala koncepto de la praktika bezono. Do, ne nur en la pentateŭko aŭ en la Talmudo, sed en la nuna socio ni trovas la esencon de la hodiaŭa judo, ne kiel abstraktan, sed kiel ege empirian esencon, ne nur kiel limigitecon de la judo, sed kiel la judan limigitecon de la socio.

3 Traduko proksimuma, ĉar originale: „Die Veräußerung ist die Praxis der Entäußerung“, en la franca traduko: „L'aliénation, c'est la pratique du désaisissement“.

II „La kapablo de la hodiaŭaj judoj kaj kristanoj emancipiĝi”.

Ekde kiam la socio sukcesas nuligi la *empirian* esencon de la judismo, la vendaĉismon kaj ties premisojn, la judo fariĝis *malebla*, ĉar lia konscio jam ne havas objekton, ĉar la subjektiva bazo de la judismo, la praktika bezono, estas homigita, ĉar la konflikto inter la individua, sensa ekzistado kaj la specia ekzistado de la homo estas nuligita.

La *socia* emancipiĝo de la judo estas la *emancipiĝo de la socio el la judismo*.

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.monedediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...*”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado; ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen laŭ la vico de ilia apero:

– **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

– **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

– **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

– **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

– **GBEGLO Koffi: Esperantuĵismo**, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

– **Johano Besada: Eseoj**, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

– **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

– **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

– **Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949**, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

– **Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

– **Karlo Markso: Dunlaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

– **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

– **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-21-2

– **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

– **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

– **Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj**. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

– **Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero“; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

– **Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1**, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuajo al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psikologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmas-trumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

– **Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo**
– **La Kuba Kvinopo, Howard Zinn:** La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky:** Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum:** La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti:** Agresso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses:** Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet:** Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani:** La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass :** La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith:** Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau:** Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith:** Raporto pri du procesoj, **James Petras:** La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma:** Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada:** La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná:** Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer:** La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

– **Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo.** Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolan0-11-3do-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300

– **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj.** Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

– **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2,** Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauer mann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

– **La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj.** Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenceproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

– **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa,** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

– **Elisée BY'ELONGO ISHELOKE: Eĥoj el Bembujo,** 2010, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

– **Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj,** elgermanigitaj de Vilhelmo Luter

mano, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

– **Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

– **Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”**, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

– **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3** (2010), Werner Seppmann: Risko-kapitalismo; Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon; Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

– **Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?** Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

– **Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako**, 2010, ISBN 9782-918300-20-5

– **Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo**. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

– **Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo**, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, 2010, ISBN 978-2-918300-24-3

– **Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

– **Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo**, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

– **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

– **Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN

– **Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en historio**, El la rusa tradukis Jurij Finkel, 2010, 57 p., ISBN 978-2-918300-36-6

– **Karlo Markso: Pri la juda demando**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8 (tiu ĉi libro)

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Iliaj tekstoj estas libere elŝuteblaj por membroj de MAS

Karlo Markso: Pri la juda demando
Monda Asembleo Socia (MAS), 2010
ISBN 978-2-918300-29-8

Enpaĝigita de MAS, per OpenOffice 3.1.1, DejaVu 10pt
sub Mandriva Linukso 2010

Presita en Germanio en la jaro 2010